# TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

## Skribsistemo Braille por Blinduloj.

### Esperanta alfabeto por la lego.

Ni presis sube figuron de l' alfabeto de Braille por blinduloj, aranĝita por apartaj literoj Esperantaj.

Tiu aranĝo, farita de Svedaj Esperantistoj, estis interkonsentita la 23-an de septembro lasta, en Genevo, de S-roj *Thylander* kaj H. *G. Andersson* por Svedoj, *Th. Cart* por Francoj, *J. J. Monnier* kaj la *direktantino de blinddomo Recourdon* en Lausanne, por Svisoj.

La Braille' alfabeto konsistas el specialaj punktliteroj, relife pikitaj en dika papero, tiamaniere ke la blinduloj povu ilin legi, palpante per la fingroj sur la punktoj.


La tuta alfabeto estas apogata sur ĉeftipo konsistanta el 6 punktoj, kiuj ricevas ĉiuj po unu ordnumero. Oni uzas 1, 2, 3, aŭ pli da punktoj laŭ la literoj.

Por skribi, oni uzas specialan larĝan liniilon, traboritan je vico de rektangulaj truoj flanke unu de la alia. En ĉiu truo oni povas skribi po unu litero, per pikileto, lasante libera (ne skribita) unu truon inter ĉiu vorto. Oni skribas de dekstre maldekstren, laŭ returna ordo de la literpunktoj, tiamaniere ke la blinduloj povu legi sur l' alia relifa flanko de l' papero de maldekstre dekstren laŭ ordinara maniero.

La ĉi-tiea figuro montras la literojn laŭ ilia formo dum la lego.

Ni metis nur signojn de literoj; — ĉiuj aliaj signoj (ciferoj, punktoj, k. c.) estas samaj kiel en nacilingvoj. Specialaj por blinduloj lernolibroj, ekzercaroj, kursoj, vortaroj, kaj eĉ gazeto estas nun en preparado aŭ en presado. Ni detale reparolos pri ĉiu afero, kiam tempo venos. «*Lingvo Internacia*» estas fiera, ke ĝi enkondukis tiun laŭdindan entreprenon en la publikon, kaj ĝi ne ĉesos subtenadi ĝin entuziasme kaj tutkore. Esperanto estas favorege akceptata de ĉiuj blinduloj kiuj konatiĝas kun ĝi, kaj eĉ multaj viduloj, kiuj ĝis nun restis skeptikaj aŭ malamikaj al ni, laŭdas kaj helpas nin de l' tempo, kiam li vidis, ke Esperanto povas treege malpli malfeliĉigi la sorton de niaj kompatindaj fratoj.

Tial ni petegas ĉiujn niajn amikojn: helpu al ni kaj disvastigu tiun entreprenon inter blinduloj kaj inter viduloj. Ni presis propagandajn foliojn, kiuj povas esti uzataj tiel bone por ordinara, kiel por speciala problindula propagando. Tiuj folioj ekzistas hodiaŭe nur en la lingvo franca: kiel eble plej baldaŭ ni presos ilin ankaŭ en aliaj lingvoj. Sed por tio kaj ankaŭ por preso de lernolibroj necese estas havi sufiĉan monon: — tial ni petas niajn malavarajn amikojn: «ne forgesu la blindulojn». Eĉ plej malgrandaj sumoj treege akcelas nian aferon, kaj ni dankeme citos en la gazeto ĉiun, kiu oferos por tio peceton el sia mono, tempo, koro aŭ spirito.




**Lingvo Internacia.**

De l' redaktoro de L. I. oni povas ricevi afrankite: *a)* Lernolibron, kun ekzercaro kaj duobla vortaro en lingvo franca (per literoj Braille). Kosto 5 frankoj; *b)* propagandajn foliojn en lingvo franca (kun klarigoj pri Blinduloj kaj Esperanto, mekanismo de Esperanto, figuro de l' alfabeto Braille por Esperanto, k. c. . . .) po 0 f 50 centimoj por 25 folioj.

La redaktoro ankaŭ sendas ĉiujn sciigojn kaj informojn pri tiu entrepreno kontraŭ poŝtmarko aŭ poŝtkarto por la respondo. Li akceptas kaj kolektas monoferojn, kaj kvitancas ilin en la gazeto.